Svenska Esperantoförbundet

Jarkongreso en Göteborg 2-4/5 2008



Intence blanka paĝo

Tagordo por la jarkunsido en Göteborg 2008

Malfermo kaj jarkunsidaj funkciuloj

1 Malfermo
2 Demando pri ĝustatempa alvoko de la kunsido
3 Elekto de jarkunsidaj funkciuloj
    a prezidanto de la jarkunsido
    b sekretario de la kunsido
    c du protokolkontrolantoj
4 Decido pri tagordo
5 Nombrado de voĉdonrajtigitoj

Raportoj

6 Raportoj
    a estrara jarraporto
    b ekonomia raporto
    c revizora raporto
7 Demando pri senŝarĝigo de la estraro

Elektoj

8 Prezidanto por unu jaro
9 Estraranoj
    a decido pri nombro da estraranoj
    b elekto de X estraranoj por du jaroj
    c unu anstataŭanto por du jaroj
10 Revizoroj
    Du revizoroj por unu jaro kaj unu anstataŭanto por unu jaro
11 Du reprezentantoj ĉe Sveda Esperanto-Instituto
12 Elektoprepara komisiono por la jarkunveno 2009

Proponoj

13 Estrara propono pri membrokotizoj
14 Proponoj al la jarkunveno
15 Buĝeto por 2009

Ceteraj demandoj kaj fermo

16 Ceteraj demandoj
    a fondaĵoj
    b jarkongreso en 2009
    c aliaj demandoj
17 Fermo de la kunsido

Jarraporto pri 2007

Estraro

Bengt Olof Åradsson, prezidanto
Bengt Nordlöf, vicprezidanto
Wim Posthuma estrarano
Mehdi Beatrix Svenonius Strid, estrarano
Ann-Lousie Åkerlund, estrarano
Roland Lindblom, anstataŭanto
Leif Nordenstorm, anstataŭanto

Krome funkciis ekster la estraro Kaisa Hansen kiel membroadministranto kaj Anita Dagmarsdotter kiel librotenanto.

La estraro tenas la kontakton plejparte per interreto sed ankaŭ kunvenis kaj en EC kaj en Helsingborg aŭ dum aliaj aranĝoj. Kiam la estraro kunvenis en Helsingborg, ili renkontis kun lokaj geesperantistoj kaj kun la dana prezidantino Ileana Schröder.

Aliaj funkciuloj

Kerstin Kristoferson kaj Börje Andersson funkciis kiel revizoroj kaj Carl-Erik Ohlsson kiel anstataŭanto de ili.

Reprezentanto de SEF ĉe Sveda Esperanto-Instituto estis Bengt Nordlöf kaj Beatrix Strid, anstataŭanto Wim Posthuma.

Roland Lindblom estis nomumita komitatano A de UEA.

Elektoprepara komisiono estis Melita Dörr (kunvokanto), Ulla Luin kaj Aino Åberg.

Reprezentanto en la laborgrupo pri ”Språkdagen”: B O Åradsson kiun je la fino de la jaro anstataŭis Bengt Nordlöf kaj Olof Pettersson.

Membraro de SEF

Je la fino de 2007 la membronombro estis 459.

Kaisa Hansen prizorgis la membroregistradon kaj dissendadon de leteroj al membroj kaj kluboj.

Esperanto-Centro

La EC estas bezonata kiel ”fenestro al la mondo” de la sveda esperantomovado. Ĝi havas sufiĉe grandan kvanton da membroj-subtenantoj, kiuj per membreco en Rondo Langlet garantias, ke SEF povas havi oficejon kaj kunvenejon en la centro de la ĉefurbo. La estraro profunde dankas kaj al la laborgrupo kaj al la sinoferaj membroj. Ĉiuj estas bonvenaj eniri la Rondon Langlet.

Pri la subteno de EC kaj la refreŝigo de la montra fenestro zorgis Ole kaj Kaisa Hansen. Ili dum la jaro beligis kaj refaris la EC-n por ke ĝi estu multfunkcia kaj bonveniga. EC estas regule malfermita dum kelkaj horoj merkrede posttagmeze. Pri tiuj deĵorhoroj respondecas Ulla Luin. Dum tiu tempo ŝi ankaŭ parte prizorgas la libroservon. EC ”apartenas al ĉiuj membroj”, do se vi estos en Stokholmo, prenu kontakton kaj ni provos malfermi EC.

Telefonvokoj, kiam neniu estas en Esperanto-Centro, estis redirektataj al la hejmtelefono de Roland Lindblom, kiu de sia hejmo priservis la membrojn kaj interesitojn.

La Espero

La membrogazeto aperis per ses numeroj (48 paĝoj) dum 2007. La kvina numero temis pri literaturo. La gazeton redaktis Leif Nordenstorm. La distribuadon prizorgis Carl-Erik Ohlsson el Skövde.

Jarkongreso en Lesjöfors

La jarkongreso 2007 estis organizita en Lesjöfors la 18-an ĝis la 20-a de majo. La invitita gasto por prelegoj estis Flory Witdoeckt, kasistino de EEU el Belgio. Ŝi prelegis dum la kongreso pri EU kaj EEU. Ŝi ankaŭ partoprenis per kantado dum la vesperaj programoj. Alia internacia gasto estis Mireille Grosjean, kiu komence partoprenis la kongreson.

Aliaj esperantoorganizoj samtempe jarkunvenis; SEJU, sveda sekcio de KELI, ILEI-se kaj Eldona Societo de Esperanto.

SEF kaj ILEI-se en kunlaboro organizis Internacian Ekzamenon de ILEI/UEA. La ekzamenotoj alvenis jam la 17-an por partopreni en la ekzameno, aŭ baza aŭ meza.

Kaisa Hansen dum la printempo iniciatis seminariserion kaj prelegantojn por progresantoj en Esperanto-Centro, Stockholmo kaj Siv Burell organizis seminariojn en Gotenburgo. Bone sukcesis naŭ kuraĝuloj en la ekzamenoj, kiujn gvidis Mireille Grosjean, Svislando, kun la helpo de Roland Lindblom kaj Agneta Emanuelsson.

Informado

Ĉijare la informado fakte abundis en Svedio en kunlaboro kun ILEI-se, Esperanto-Gården kaj lokaj kluboj.

"Språkdagen" – Eŭropa tago de lingvoj.
Granda aranĝo estis la 26-a de septembro kiu estas la Eŭropa tago de lingvoj. Ĝi estas aranĝo de EU depost 2001 kiam partoprenis 45 landoj. Ankaŭ ĉi-jare la Eŭropa komisiono eldonis broŝuron kun eŭropaj lingvoj, inter ili ankaŭ Esperanto. Vidu www.sprakdagen.nu. En Stockholm Ulla Luin, Roland Lindblom kaj Bengt Olof Åradsson prezentis Esperanton en Serieteket en Kulturhuset kune kun aliaj organizoj kiuj volas ke ni pli bone kaj pli multe lernu lingvojn.

"Skolforum"
Tritaga ekspozicio por lernejaj instruistoj okazis fine de oktobro. SEF partoprenis por la deka fojo. Loko estas Stockholms-mässan en Älvsjö. Certe kelkaj miloj el la 20 mil vizitantoj povis vidi ke Esperanto aperas kaj disdonas informon. Kun kelkaj centoj ni havis ŝancon interbabili. Lars Forsman, Karlskoga gvidis, preskaŭ ĉiun horon, lecionojn por interesuloj. Helpantoj por paroli kun instruistoj estis Kerstin Rohdin, Lars Forsman, Carl Mäsak, Roland Lindblom kaj Johan Krig Ölund.

"Studentliv" kaj "IQ-student"
Studentliv estas TCO-gazeto kiu aperas 4-foje jare al svedaj studentoj. SEF anoncis kelkfoje ankaŭ 2007 en ĝi. Ĉi-jare ni ankaŭ anoncis en pli granda gazeto IQ student (nuntempe Studentmagasinet) por novaj studentoj forlasante la gimnazion. Estas malfacile scii kiom da studentoj, inter miloj da ricevantoj, kiuj vidis niajn anoncojn. Ni tamen povas konstati ke SEF havas multajn vizitantojn interrete. La plej multaj el la aĉetantoj de START-paket estas studentoj.

Informlibro Dr Zamenhof
SEF aĉetis kvanton de la libro *Dr Zamenhof och det internationella språket*. Ĝin ni pluvendis al kluboj por ke oni povu informi pli profunde al interesuloj. Restas ankoraŭ ekzempleroj ĉe la libroservo de SEF.

Retpaĝo www.esperanto.se
Nia retpaĝo bone funkcias kaj evoluiĝas. Multe da daŭra laboro faras Ulla Luin, Janko Luin kaj Jessica Hanmeier por ke ĝi estu freŝa. Per la kontaktilo, sufiĉe multaj demandoj venas. Ofte temas pri pli da informo kaj por aĉeti librojn. Estas interese ke multaj gimnazianoj kaj studentoj volas skribi ion pri Esperanto. Ŝajne ili ie aŭdis ion pri Esperanto kaj tiu semo iom kreskis.

"Folkrörelseforum"
Ulla Luin kaj Roland Lindblom aranĝis informtablon kaj parolis kun multaj interesuloj.

Montrofenestre
La montrofenestro de Esperanto-Centro en Stokholmo ĉiam montras librojn, gazetojn kaj alian informon. Ĝin prizorgis Kaisa Hansen.

Por estontaj informado kaj ekspozicioj
SEF transprenis la tutan ekspozicimaterialon, kiun Esperanto en Väsby kolektis dum pli ol 15 jaroj. Temas pri ekspozici-kadroj kaj paneloj kiuj nun estas stokitaj en Esperanto-Gården. La celo estas ke oni povu aranĝi seminariojn en Esperanto-Gården por konstrui ekspoziciojn kaj ke ĉiuj kluboj povu pruntepreni ilin.

INFO al membroj pere de la reto
Kaisa Hansen kiel kunordiganto prizorgis aktualan informadon al ĉiuj membroj kiuj donis sian retadreson.

Kio eble mankas en nia informagadoj estas kunordigata produktado de materialoj kaj disigo de efikaj ideoj. Multaj membroj senpage kaj libervole kaj interese laboras pri

informado sed ni devas evoluiĝi kaj esti pli profesiaj kaj efikaj. Ofte ni en lastaj momentoj rimarkas ke ni ne havas taŭgan materialon kaj tro rapide produktas ion. Multaj el ni devas ankaŭ konfesi ke ni ofte uzas la ideojn de hieraŭ por kapti la generacion de morgaŭ.

Esperanto-Gården
Esperanto-Gården, Lesjöfors, en kiu SEF posedas kooperajn akciojn, ludas gravan rolon en la informado, ĉar esperanto-broŝuroj kaj libroj estas disponeblaj por ĉiuj vizitantoj. Tie troviĝas la grava konsulta biblioteko de SEF.

Dum la Eŭropa tago de lingvoj okazis granda ekspozicio tie. Venis vizitantoj (ĉefe enmigrantoj) kaj gastoj de la migrantejo. Lennart Svensson organizis kaj eĉ donis provlecionojn. Wim Posthuma helpis dum la aranĝado

Eksteraj rilatoj
SEF membras en la Sveda UN-asocio kaj partoprenas ĝiajn aranĝojn. Roland Lindblom estas la reprezentanto de SEF.

Bengt Nordlöf reprezentis SEF en EEU (Eŭropa Esperanto Unio).

Ni kunlaboris kun *Internationella programkontoret* por la aranĝo de Eŭropa tago de lingvoj, pri kiu ni supre raportis.

Edukado
Kiel organizo SEF ne aranĝis kursojn dum 2007 sed dependas de la loka agado. Plurloke la kluboj kaj regionoj aranĝis kursojn, ofte dum semajnfinoj. Mankas detalaj informoj pri ili. La loka agado estas grava por ke ni trovu novajn esperantistojn sed ankaŭ por ke ni plibonigu nian lingvoscion. Kun granda ĝojo ni povas konstati ke la iniciato, antaŭlaboro kaj la kunlaboro inter SEF kaj ILEI-se por ke ni povu havi internacian ekzamenon en Svedio donis frukton kaj ni esperas ke ni povos aranĝi internaciajn ekzamenojn ankaŭ dum estontaj jarkongresoj.

Dum 2007, SEF ekonomie subtenis Carl Mäsak por ke li povu partopreni en la internacia universitata kurso en Poznan, Pollando.

UEA-peranto kaj gazetabonoj
Ĉefdelegito Lisbet Andreasson daŭre prizorgis la peradon de kotizoj al UEA kaj al la UK. Ŝi ankaŭ peradis la abonojn de internaciaj esperantogazetoj.

Ekonomio
Danke al la engaĝiĝo de la membroj ĉirkaŭ diversaj aranĝoj kaj al donacoj la ekonomia situacio estas parte bona. La ekonomia plifortiĝo pro la donacoj celas plejparte edukadon kaj informadon pri Esperanto kaj ne por la ĉiutagajn elspezojn de SEF. SEF do ankaŭ estonte estos dependa de la sindonemo de siaj membroj. Ni esperas ke pli multaj volas esti Rondo Langlet-membroj kaj tiel subteni nian movadon. Plej granda helpo tamen estus kresko de la membraro.

Finvortoj
La impona formikejo ne estas konstruita per kelkaj grandaj bastonoj sed per multaj, preskaŭ sensignifaj branĉetoj, folioj kaj simile. Same nia movado devas kreski, ne nur per grandaj agadoj, kvankam kelkfoje signifaj kaj gravaj, sed per tio ke multaj kontribuas per sia kapablo kaj siaj eblecoj. La estraro de SEF volas danki ĉiujn kiuj iel subtenis kaj laboris por nia lingvo kaj nia movado. Kelkaj personoj estas per nomoj menciitaj en tiu ĉi raporto sed multaj nomoj mankas. La estraro ankaŭ volas sendi siajn dankesprimojn al tiuj ”anonimaj” mallaciĝemaj laboristoj.

.

Stokholmo en majo 2008

La estraro de Sveda Esperanto-Federacio

Klubaj agadoj 2007

Kelkaj kluboj sendis informon, el kiu ni ĉerpis, por prezenti sian kluban agadon. Bedaŭrinde mankas informo de kelkaj kluboj.

Kluba agado en Norrköping
Prezidanto: WILHELM TERNBORG
Kluba agado: Norrköpings Esperantoklubb aranĝis naŭ kunvenojn, kiuj samtempe estis kulturaranĝoj de la studorganizo NBV. Partoprenis inter 15 kaj 21 personoj.

Internacie la klubo helpas al kvin esperantistoj en Afrikaj landoj. La klubo ankaŭ havas regulajn kontaktojn kun siaj ĝemelaj urboj Riga, Tampere kaj Trondheim.

Informado: Haldo Vedin estis invitita al la matenmanĝa kunveno de la Rotary-klubo S:t Ragnhild en Söderköping por informi. La kluba informilo "Kelklinie pri..." aperis kvinfoje kun entute 32 paĝoj kaj estis distribuata krom al la klubmembroj ankaŭ al aliaj interesatoj en- kaj eksterlande.

Membraro: Dum la jaro unu membro aliĝis kaj du eliĝis. Je la fino de la jaro la membronombro estis 37.

Edukado: Kaj printempe kaj aŭtune la studorganizo NBV aranĝis du diversnivelajn daŭrigajn kursojn kun kvar kaj ok partoprenantoj.

Ceteraj agadoj: Neniu klubano partoprenis UK. Nils Pettersson solkantis esperantajn kantojn ĉe la kristnaska festo de la Naturskyddsföreningen. Haldo Vedin tradukis sveden grandan parton de Lernu. La katrineholma branĉo fariĝis 20-jara.

Kluba agado en Gotenburgo
Prezidantino: ANITA DAGMARSDOTTER
Kluba agado: Ĉiun mardon dum la printempa kaj aŭtuna semestro la klubo kunvenis en la ejo de Masthuggsliden. Unufoje monate estas vespera programo. En majo la klubo aranĝis arkipelagan ekskurson kune kun la kubanino Maritza Gutierréz González. Dum la somero okazis kafejaj renkontiĝoj.

Informado: La klubo partoprenis en *Internationella Lövgärdetdagen* la 15an de septembro kaj informis la publikon. Ankaŭ ĉi-jare la 26an de septembro, kiam okazis la Eŭropa tago de lingvoj, la klubo informis en Språkcaféet. La kluba gazeto Inter-LIGILO aperis kvarfoje kaj estis ankaŭ senditaj internacie kaj al aliaj kluboj. La kluba hejmpaĝo estas www.esperanto-gbg.org.

Membraro: Je la fino de la jaro la klubo havis 65 membrojn.

Edukado: Magnus Henoch gvidis konversacian kurson ĉiun unuan merkredon monate. Bedaŭrinde aliĝis tro malmultaj personoj al la anoncitaj komencantaj kursoj.

Cetere: La gotenburga urbo kontaktis la klubon pri la nova aspekto de la Esperantoplatsen. La nova aspekto similos al kuŝanta flago (gazono) kaj la ĉirkaŭaj benkoj havos esperantajn tekstojn.

Kluba agado en Stokholmo
Prezidantino SOILE LINGMAN
Kluba agado: Ĉiun merkredon ni havis kluban renkontiĝon en EC. La partoprenantoj nombris inter kvar kaj 13, la plej multaj kiam vizitis Maritza Gutierréz González. Aliaj internaciaj vizitantoj estis Maxime de Francio kiu piediris tra Eŭropo kaj la franco Robert Kueney survoje al Finnlando kaj Anne Valk de Tallinn.

Ni ankaŭ aranĝas festojn de lumo (Lucia) kaj printempo. Al tiuj festoj ni invitas membrojn el la tuta regiono. Dum somero ni aranĝas kafejajn renkontiĝojn diversloke kaj en aŭgusto ni havas tuttagan ekskurson.

Informado: Kvankam la klubo ne havas propran retan paĝon vi povas trovi informon ĉe www.mycalendars.net/esperanto_se pri la kluba agado. La paĝon redaktas Kaisa Hansen.

Nia kluba gazeto EKSpreso nun havas novan redaktoron kaj ŝanĝis sian aspekton. Kvinfoje ĝi estis dissendata al niaj membroj kaj al kelkaj aliaj interesuloj. Krome ni sendas ĝin devige al sep referenc-bibliotekoj.

Membraro: Je la fino de la jaro la klubo havis 81 pagantajn membrojn. Jam kelkaj junuloj membriĝis por la sekvonta jaro.

Esperanto-Centro: La klubo havas siajn kunvenojn en Esperanto-Centro kaj pro tio la klubo kaj helpas per la taga prizorgo de la ejo kaj helpas ekonomie.

Kluba agado en Upplands Väsby
Prezidanto OLE HANSEN
Kluba agado: Projekto Erik – temas pri ekspocizioj. La materialo nun estas vendita al SEF kaj estas stokita en Esperanto-Gården por ke ĉiu klubo povu pruntepreni kaj mem aranĝi. La projekto ankaŭ kreis la montran fenestron en Esperanto-Centro.

Projekt Artur – la klubo aranĝas kurante la arkivan materialon en la komuna arkivo.

Projekto Ekzameno en Svedio – nia malgranda klubo komencis grandan projekton je la fino de 2006 kaj ĝi daŭris printempe 2007. La projekto

celis ke la partoprenantoj povu ekzameniĝi dum la SEF-kongreso 2007.

Projekt Roskull – kunligate kun la ekzamena projekto ni komencis tiun ĉiu projekton por informi lingvajn instruistojn. Dum unu sabato Bertil Nilsson instruis kun la helpo de Kaisa Hansen sep geinstruistojn. La aranĝo estis laŭdata.

Membraro: 14 personoj estas membroj de la klubo. Honoraj membroj: Jean Amourou, Francio, Odd Tangerud, Norvegio, Louis C Zaleski-Zamenhof, Francio.

Informado: La redakcio produktis du informilojn/gazetojn "Språket Esperanto" kaj unu informilon lige kun Skolforum.

- Nr 005 – celis instuistoj kaj gelernantoj kaj enhavis lingvajn detalojn
- Nr 006 – celis gestudentoj kaj informis pri diversaj internaciaj kursejoj
- Eniro al Esperanto – kreita de Roland Lindblom celante Skolforum

Kluba agado en Helsingborg

Prezidantino ANN-LOUISE ÅKERLUND

Kluba agado: La klubo havis dum la jaro sep monatajn renkontiĝojn en la biblioteko kaj krome gvidatajn ekskursojn al Ramlösaparken kaj Helsinoro. Je pluraj okazoj oni havis kontakton kun la kluboj en Malmö, Lund kaj Kopenhago.

Membraro: Je la jarfino la klubo havis 16 membrojn.

Edukado: La klubo aranĝis kurson por dek komencantoj kaj havis entute 16 renkontiĝojn dum la printempo kaj 14 dum la aŭtuno. Oni uzas la lernolibron EpoGo. La konversacio kurso daŭre laboris dum la jaro kaj uzas la libron Vojaĝo en Esperantolando. Tri membroj partoprenis studrondgvidantan kurson ĉe ABF kaj kvin membroj la semajnfinan kurson en Mullsjö.

Kluba agado en Skövde

Prezidanto KARL-GUSTAF GUSTAFSSON

Kluba agado: 8-foje la membroj renkontiĝis en propra klubejo. La programoj estis tre variaj kun prelegoj, diskutoj kaj konkursoj. Krome estis printempa ekskurso kaj literaturkonkurso kun 7 partoprenantoj. La klubo havis regulajn kontaktojn kun esperantistoj en Ĉinio kaj Nederlando.

Membraro: Skövde Esperantoklubb dum la jaro 2007 havis 24 membrojn.

Edukado: La klubprezidanto K-G Gustafsson gvidis "distanc-edukadon" per interreto kun 35 studantoj. Kvin el ili (en Usono, Kanado kaj Anglujo) estis tiel sukcesaj, ke ili ekhavis diplomojn.

Informado: En la klubejo la kluba bibliotekisto Hilgon Frisk prizorgis la bibliotekon kaj povis noti plian evoluadon. La klubmembroj Carl-Erik Olsson kaj Solveig Bertilsson daŭrigis helpi SEF kun prezado kaj distribuado de La Espero, granda laboro kiu tre malaltigis la gazetajn kostojn por SEF.

Kluba agado en Västerås

Gvidanto: WIM POSTHUMA

Kluba agado: Dum la jaro la klubo havis du klubkunvenojn.

Unu pli granda eksteren direktita aranĝo okazis, nome en majo kune kun *Kubanska Kulturföreningen, ABF kaj la kulturasocio Folkets Park* estis aranĝita renkontiĝo kun la lokaj latinamerikanoj kaj S:ino Maritza Gonzales en la granda salono de Arosgården. Maritza rakontis en la hispana pri sia lando Kubo, pri sia laboro kiel radioĵurnalisto kaj pri la laboro por esperanto en Latin Ameriko. La publiko havis multajn demandojn pri Esperanto.

Dum la kunveno ankau okazis muziko kaj kantado en esperanto ekz. "Knabino de Havano" kaj svede kaj esperante. Kaj Stridell anoncis la muzikaĵojn en 2 lingvoj.

Dufoje Maritza estis intervjuata en la radio. Unue de la hispana redakcio de la proksimradio Vår Radio kaj due de la Sveda Radio P4 (Radio Västmanland) en iom pli longa programo kun E-muziko.

Membraro: La klubo havis je la jarfino 11 membrojn.

Informado: Unu numero de La VEKa Bulteno aperis

Kluba agado en Södertörn

Prezidanto ROLAND LINDBLOM

Kluba agado: La plejparta agado de la klubaj membroj okazis aliloke. La klubo organizis la viziton de Maritza González en Svedio. Kerstin Rohdin vizitis aliajn klubojn kaj prelegis pri Astrid Lindgren aŭ gvidis diskutrondon surbaze de la libro Eduko Danĝera. Gravan taskon plenumas Roland Lindblom kaj Roland Larsson farante novan Esperanto-svedan vortaron. Alia membro, nome Bengt Nordlöf, faras grandan laboron por la somerkursoj en Lesjöfors.

Ulla ĉesis sian laboron kiel ĝenerala sekretario de UEA post trijara servado. Nun Ulla i.a. prizorgas la malfermitajn horojn de Esperanto-Centro kaj kune kun Janko Luin kaj Jessica Hanmeier ĝisdatigas la hejmpaĝon de SEF.

Resultaträkning 2007

Intäkter	**2006**	**2007**
3110 Libroservo	20 042,00	27 015,70
3120 Startpaket	5 465,00	6 047,00
3122 Peranto	6 811,90	8 935,00
3132 La Espero – Abonoj	3 763,38	2 335,05
3149 SEF-kongress intäkt	0,00	42 175,00
3150 Intäkt hyra EC	4 320,00	5 480,00
3899-3900-01 Medlemsavgifter	67 500,00	64 700,00
3903-04 Rondo Langlet	40 060,00	32 260,00
3905 Uttag ur fonder	73 100,00	104 101,54
3985 Bidrag och gåvor	14 462,81	3 050,00
3990 Bidrag Skolforum		3 000,00
Summa	**235 525,09**	**299.099,29**
Kostnader		
4010 Inköp materiel /Libroservo	45973,95	32 241,67
4110 La Espero - á conto	8840,00	0,00
4111 La Espero - Tryck	10080,00	13 800,00
La Espero - Frakt	500,00	
4112 La Espero - Porto	11607,00	13 645,20
4113 La Espero - Kuvert	8643,00	
La Espero - Övrigt	0,00	500,00
4120 Utställningsmateriel		8 000,00
4150 Egna arrangemang	0,00	185,50
5010 Lokalhyra EC	43588,00	44 156,00
5020El för EC	6402,04	8 499,00
5090 Övr kostnader EC inkl rep	1147,5	17 601,54
5410 Förbrukningsinventarier	7215,00	8 583,00
6000 Styrelsekostnader	13286,19	5 846,00
6001 SEF-kongress kostnad	5374,00	51 602,00
6020 Medlemskap i andra org inkl SEI	7429,95	5 807,70
6050 Stipendier och bidrag		10 370,00
6100 Internet	4149,00	5 090,00
6110 Kontorsmateriel	2024,50	3 305,00
6150 Trycksaker	7509,06	28 912,50
Annonser	3763,00	
6152 Skolforum	33000,26	33 449,00
6190 Övriga arrangemang		5 836,00
6240 Tele	2488,00	2 609,00
6250 Porto	8005,00	3 752,00
6310 Försäkringar	1000,00	900,00
6380 Bank-pg kostnader	713,21	901,00
6390 Övriga kostnader	5302,14	879,50
Summa	**238 040,80**	**306 471,61**
Årets överskott /-underskott	-2 515,71	-7 372,32

Balansräkning 2007

TILLGÅNGAR	Utg balans	SKULDER OCH EGET KAPITAL	
1220 Inventarier	0,00	2010 Eget kapital	126.798,18
1225 Osäkra fordringar / Andelar	0,00	2011 Fonden Olle Olsson	307.083,73
1229 Ack avskrivn inventarier	0,00	2014 Fonden NEK	333.305,00
1386 Fordran RL	0,00	2015 Fonden Utveckling	774.007,23
1387 Kortfristig fordran	10.695,00	2016 Lånereservering till Utv.fonden	152.448,50
1388 Övr långfri fordringar	152.448,50	2019 Redovisat resultat	-7.371,85
1910 Kassa - E-C	0,00	2300 Fond avsatt för EC	6.000,00
1920 PlusGiro	28.839,92	2398 Skuld UEA-UK88	24.610,00
1923 UEA-konto sefd-g	2.989,21	2399 Övr skulder 2399	4.794,06
1929 Hyresdeposition	18.144,00	2710 Medlemsavgift nästa år	1.980,00
1930 Handelsbanken Checkräkning	220.569,28	2711 Medlemsavgift KM nästa år	0,00
1931 JAK-Banken 1063036014	7.770,00	2890 Övr kortfri skulder	10.528,78
1932 SHB aktiefond 529 240 823	200.000,00	2999 Interimsskuld	4.000,00
1933 SHB aktiefond 448 324 423	533.848,72		
1934 SHB aktiefond 448 324 393	500.000,00	**Summa Skulder**	**1.738.183,63**
1935 Premieobligationer	50.000,00		
1999 Interimsfordran	12.879,00		
Summa Tillgångar	**1.738.183,63**		

FINANSIELLA KONTON

7832 Avskrivning Inventarier	0,00
7833 Avskrivning Osäkra fordringar	0,00
8300 Ränteintäkter	43.122,12
8301 Ränteintäkter Fördelning	-43.122,12
8305 Värdeändring i bankfonder	0,00
8306 Värdeändring i bank - Fördelning	0,00
8400 Räntekostnader	0,00
8999 Redovisat resultat	7.371,85

Noter

UTTAG FÖR INFORMATIONSVERKSAMHET	
4120 Utställningsmateriel	8.000,00
4150 Kostnad egna arrangemang	185,50
5090 Övr kostnader hyrd lokal	17.601,54
5410 Förbrukningsinventarier	8.583,00
6050 Stipendier och bidrag	10.370,00
6150 Informationsmaterial, annonser	28.912,50
6152 Skolforum	33.449,00
Summa	**107.101,54**
Avgår: 3990 Bidrag Skolforum	3.000,00
Summa	**104.101,54**

Propono de la estraro

Buĝeto

Enspezoj	2008	2009
Membrokotizoj	65 000	60 000
Rondo Langlet	45 000	40 000
Diversaj donacoj	5 000	7 000
Elpreno el fondusoj	83 000	80 000
Rentumoj	9 000	9 000
Vendado de libroj kaj informiloj	33 000	33 000
Makleraĵoj	9 000	9 000
La Espero, abonoj + anoncoj	2 000	2 000
Luigo de EC	4 000	4 000
Summa	**255 000**	**244 000**

Elspezoj	2008	2009
Aĉetoj de libroj /informiloj	20 000	20 000
La Espero	30 000	30 000
Esperanto-Centro	65 000	65 000
Estrarkostoj	20 000	10 000
Administrado	10 000	10 000
Oficejaĵoj	3 000	3 000
UEA-k., EEU-kotizoj ktp	6 000	6 000
SEF-kongreso 2008	12 000	0
Stipendioj, kontribuoj	6 000	7 000
Skolforum	33 000	33 000
Libro-foiro Gbg	14 000	15 000
Kontaktoj kun najbaraj landoj	5 000	
Anoncoj	15 000	15 000
Neantaŭvidate	16 000	30 000
Summa	**255 000**	**244 000**

Membrokotizoj por 2009

Rekta membro / direktmedlem	200:- kr
Tuta familio / hel familj	300:- kr
Juna membro / ungdomsavgift	100:- kr
Kluba membro / klubbmedlem	160:- kr
Tuta familio / hel familj	240:- kr
Juna membro / ungdomsavgift	80:- kr

La Espero

En la mondon venis nova sento,
tra la mondo iras forta voko;
per flugiloj de facila vento
nun de loko flugu ĝi al loko.
Ne al glavo sangon soifanta
ĝi la homan tiras familion:
Al la mond' eterna militanta
ĝi promesas sanktan harmonion.

Sub la sankta signo de l'espero
kolektiĝas pacaj batalantoj,
kaj rapide kreskas la afero
per laboro de la esperantoj.
Forte staras muroj de miljaroj
inter la popoloj dividitaj.
Sed dissaltos la obstinaj baroj
per la sankta amo disbatitaj.

Sur neŭtrala lingva fundamento,
komprenante unu la alian,
la popoloj faros en konsento
unu grandan rondon familian.
Nia diligenta kolegaro
en laboro paca ne laciĝos,
ĝis la bela sonĝo de 1' homaro
por eterna ben' efektiviĝos.

LL Zamenhof